


ESPERO KATOLIKA



*Panoramo de nia Kongresejo apud Romo, vidita de la
„Madonna del Tufo”:*

la blanka konstruaĵaro estas la „Centro por pli bona Mondo Pio XII”, trans la lago de Albano estas la papa somera restadejo Kastelgandolfo, kie okazos la aŭdienco por la kongresanoj.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Februaro 1962

Jarkolekto 59 - no. 521

ESPERO KATOLIKA

Fondita de Pastro Emile Peltier, Tours (Francujo) en 1903.
Oficiala Organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
fondita de Pastro Richardson en 1910 en Parizo.

Prezidanto: sac. A. Beckers, paroĥestro, KWAADMECHELEN-L (Belg.)

Redakcio kaj Administracio: F-ino Truus Durenkamp,
Frederikstraat 2, DORDRECHT (Nederl.) Poŝtkonto 214009



JARABONO + libervola krompago por biblio-aldonoj: vidu malsupre

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

Argentino: Argentina Esperantista Katolika Asocio, Alsina 340. Buenos Aires

Aŭstralio: S-ro V.J. Timmins, 73 Alexandria Parade, HORNSBY N.S.W.

ŝil 15 + 2/6

Aŭstrujo: S-ro W. Mudrak, Beatrixg. 19/9, WIEN III, p.k. 105.713 ŝil.43+7

Belgujo: S-ro H. Vermuyten, Albertstr.16, ANTWERPEN p.k.207606 frs.83+14

Brazilo: B. E. L., Praça da República 54, 1º, RIO DE JANEIRO

Kanoniko Is. Lagares, C. Postal 34, UBERABA, M.G.

Brita Imperio: S-ro N.W. Vigar, 28 Franklands Drive, ADDLESTONE,

Surrey, Anglujo, ŝil.12+2

Francujo: S-ro Pierre Muffang, 14bis Avenue de Galois,

BOURG-LA-REINE (Seine) p.k. Paris 224-82. NF 8,25+1,50

Germanujo: S-ro Hans Stahl, Pestalozzistr. 4/1,

(13a) WEIDEN (Oberpf.) p.k. Nürnberg 634.33 D.M. 6,75+1,10

Hispanujo: S-ro Franc. Tur Riera, San Carlos 6, IBIZA (Balears) pes.100+17

Irlando: S-ro Lorcán O'hUiginn, 2 Burgh Quay, Dublin.

Italujo: U.E.C.I., Viale dei Mille 37,

MILANO, pk. 3/7791 C. C. Ferrari, lire 1100+170

Japanujo: F-ino D-ro Ĉisato Jamagata, 2-5 Otaki-Cho, YOKOSUKA Yen600+100

Jugoslavio: Patro Felix Stricki, Hadzi Melentija 75, BELGRADO

Kanado: S-ro C. R. MacDonald, 9445 Millen Avenue,

MONTREAL 12, P.Q. \$2,00+0,30

Madagaskaro: S-ro E. Raveloson, B.P. 1678, TANANARIVE p.k. 254-22

FrsCFA 420+70

Nederlando: Kasisto Nederlanda Katoliko, Nieuwstraat 28,

BOSKOOP p.k. 121449 f 7,00+1,00

Nov-Zelando: D-ro J. Hamvai, 33 Arran St. Avondale, AUCKLAND ŝil.12+2

Polujo: S-ro Antono Zoglowek, ROZA WIELKA, pow. Walcz. zlot.130+20

Portugalujo: S-ro Alf. L. Sales, Bairro Olhavas, Prédio Nunes, LEIRIA esk.48+8

Svisujo: Sac. W. Flammer, paroĥestro, Zürchersmühle A.R. fr. 7,25+1,25

Urugvajo: D-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Flor.)

Usono: S-ino Wm. McGrogan, 2109 Parkwood Drive. N.W.

WARREN, Ohio. U.S.A. \$ 2,00+0,30

La nomita kotizo validas por membreco de I.K.U.E. inkluzive abonon je ESPERO KATOLIKA. Novaj membroj bonvolu krompagi unufoje 5% de la jarkotizo por kostoj de adreskliŝo, membrokarto ktp. Adresŝanĝintoj informu tuj la reprezentanton aŭ nian Administracion, aldonante respondkuponon por la nova adreskliŝo.



ESPERO KATOLIKA

KARAJ LEGANTOJ

Jen nia jarlibreto 1962. Ĝi kaŭzis al mi grandajn zorgojn, multajn noktajn horojn, kaj tamen ne estis ĝustatempe preta, por povi aperi kune kun Espero Katolika, la unuan de la monato. Niaj legantoj certe pardonos al mi kaj al la presisto, kiu ja ankaŭ ne povas fari ĉion samtempe!

Se vi rigardos la finanĉan staton de IKUE, vi rimarkos ke ĝi estas tute sana; kompreneble iom da malprofito dum kelkaj jaroj ne povus detrui ĝin, sed feliĉe ni eĉ havis belan profiton, dank' al la malavaraj donacoj kiujn ni ricevis. Ni pripensas propagandon pere de faldfolioj en diversaj lingvoj, kaj volonte ricevos proponojn resp. tekstojn de niaj fidelaj membroj.

Pro diversaj kialoj la membronombro iom malkreskis, malgraŭ la fakto ke ni enskribis 125 novajn anojn. Sed ni esperas ke la forigitaj nepagintoj pentos, ke ankaŭ aliaj, kiuj ekzigis, revenos, kaj precipe ke nia politike tute neŭtrala revuo baldaŭ libere estos allasata en Orienteŭropo! Intertempe vi ĉiuj faru vian eblon, varbi novajn membrojn. Mi volonte sendos provekzempleron de E.K. al adresoj de katolikaj esperantistoj, kiujn vi sendos al mi; ankaŭ vi povos akiri mem kelkajn ekzemplerojn pasintjarajn por tiu celo. Organizontoj de lokaj aŭ landaj kongresoj, de ekspozicioj ktp. petu nombron da provekzempleroj por disponigi al partoprenontoj, resp. vizitontoj. Per ĉies helpo nia membronombro certe kreskos, kaj tiam ankaŭ la amplekso de nia revuo.

En la nuna kajero ne estas multaj fotoj; mankis la materialo. Se vi havas interesan artikolon — kiel vi povis legi diversajn en la pasintaj monatoj — ensendu ĝin, aldonante kelkajn fotojn, aŭ pli bone, kliŝojn, se vi povos prunti ilin ĉe naciaj revuoj (ne ĉe ĵurnaloj, ĉar tiuj teknike ne taŭgas por nia papero): ĉar ĉiu kliŝo kiun ni devas farigi de foto, kostas al ni almenaŭ la prezon de 2 jarkotizoj! Cetere mi nun regule ricevas sufiĉe multajn artikolojn, kiuj eĉ ne ĉiam tuj povas aperi, sed kompreneble la aktualaĵoj ne povas longe atendi kaj estas lokigataj kiel eble plej baldaŭ. Ensendintoj do kelkfoje havu paciencon! Pro la ekstra laboro por la jarlibro — por kio mi antaŭe devis aranĝi mian dum monatoj postrestintan administracion! — amasiĝis la respondotaj leteroj: kelkaj skribintoj jam malpacientiĝis kaj plendis, sed pripensu, ke mi havas multajn taskojn kaj nur du manojn, kiuj povas priludi nur unu skribmaŝinon samtempe! Ĉiu p.k. kaj ĉiu letero ricevos respondon, kvankam la plej multaj eĉ forgesas aldoni respondkuponon, kio kostas al nia kaso ĉiujare grandan sumon! Tre koran dankon pro la multaj bondeziroj kaj preĝpromesoj por la sanstato de mia kara patrino; dank' al Dio ŝi fartas iom pli bone, kvankam ŝi restas malforta kaj ofte tre suferas. Espereble ŝi resaniĝos kaj havos ankoraŭ kelkajn trankvilajn jarojn!

Truus Durenkamp.



LKK-sekretariino :
 F-ino Elena Cipriani,
 Via R. Bonghi 34
 ROMO — Italujo.

OKA BULTENO



La programo, kiun ni proponas por nia Kongreso, estas nur provizora. Post ricevo de Sugestoj de niaj Kongresanoj, ni ankoraŭ pridiskutos ĝin kaj donos la definitivan formon.

Marde 14 - VIII

Alveno de la Kongresanoj al: CENTRO PIO XII — PER UN MONDO MIGLIORE (por pli bona Mondo) — ROCCA DI PAPA (Roma) — Disdono de la dokumentoj — ekloĝiĝo.

20.00 h. Interkona vespero.

Merkrede 15 - VIII

Soleno de la Ĉielenpreno de Maria.

- 9.00 h. Sankta Meso en la preĝejo de la Ĉielenprenita (Kongresejo), kun kantoj, preĝoj kaj Esperanto-prediko.
- 10.30 h. Solena inaŭguro en la Aŭditorio de la Kongresejo.
- 12.30 h. Oficiala fotografado.
- 13.00 h. Komuna tagmanĝo.
- 14.30 h. Ĝenerala kunveno L.A.F.
- 16.00 h. Inaŭguro de l'Esperanto-Ekspozicio.
- 17.00 h. Prelego.
- 18.00 h. Filmo pri la Sankta Lando, kun komento de Patro Cecchitelli O.F.M.
- 19.00 h. Komuna vespermanĝo.
- 20.30 h. Estrarkunveno I.K.U.E.

Ĵaŭde 16 - VIII

- 5.30 h. Tuttaga ekskurso de la Junulara Sekcio (vidu la 6-an bultenon)
- 8.00 h. Diservo.
Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj (por la ne-partoprenantoj al la Jun. ekskurso).
- 12.30 h. Komuna manĝado.
Libera vespero.

Vendrede 17 - VIII

- 8.00 h. Diservo.
- 9.00 h. Prelego.
- 10.00 h. Fakaj kunvenoj: Sacerdota Rondo „Pio X”, kaj aliaj; oni anoncu sin ĉe la LKK.

- 12.30 h. Komuna tagmanĝo.
- 15.00 h. Ĝenerala kunveno I.K.U.E.
- 20.00 h. Komuna Vespermanĝo.

Sabate 18 - VIII

- 8.00 h. Diservo.
- 10.00 h. Vizito al la Roma Urbestro.
- 13.00 h. Komuna tagmanĝo.
- Papa aŭdienco (Kastelgandolfo).
- 20.20 h. Komuna vespermanĝo.

Dimanĉe 19 - VIII

- 9.00 h. Diservo.
- 10.30 h. Prelego kaj diskutoj.
- 12.00 h. Komuna tagmanĝo.
- 19.00 h. Komuna vespermanĝo.
- 20.00 h. Arta vespero.

Lunde 20 - VIII

- Tuttaga ekskurso al Asizo (Assisi).

Marde 21 - VIII

- 9.00 h. S. Meso.
- 10.00 h. Oficiala Fermo de la kongreso.

Nia celo, proponante ĉi tiun programon, estis doni sufiĉan parton ne nur al la Kongresaj laboroj, sed ankaŭ al fakaj kunvenoj. Ĉi tiuj tamen, se necese, povos tute facile okazi dum kelkaj aliaj liberaj tempoj, ekz. vespere, ĉar ĉiuj ja loĝas en la Kongresejo mem! Sed ankaŭ nia ĉefa tasko estis lasi la plej taŭgan tempon por viziti Romon kaj la ĉirkaŭaĵojn, kun iliaj naturaj kaj artaj allogaĵoj, ĉar ni bone scias, kiom la plej granda parto de la partoprenontoj ĝin sopiras. Pri ĉiu detalo ni donos ĉiujn eblajn klarigojn. Pro tio, ni petas, ke se vi havas specialajn demandojn, *tuj* bonvolu skribi al ni!

Detalojn pri aliaj fakaj kunvenoj ni publikigos post kiam ni estos ricevintaj ilin de la koncernaj fakoj. Ankaŭ ni poste informos vin pri la temoj de predikoj kaj prelegoj, kun la nomoj de la koncernaj parolantoj.

Ĝis 1.1.62 anoncis sin 206 kongresanoj.

Propagandu nian Kongreson pere de la specialaj poŝtkartoj sur fotopapero, kiujn eldonis la LKK; prezo por 5 ekz. 1 ned. guld. = 4 steloj.

„LA KRIMULO KAJ NI” – II

II. Kiu estas la kialo, ke tiu homo estas tia, kia li estas?

En la dua parto de mia artikolo mi volas paroli pri la plej esencaj fonoj de la ne-sociala, kontraŭ-socia, krima agado de la homo: la misfarado de la homo en la leĝa senco de la vorto. Ekzistas ankaŭ iaj formoj de misfarado, kiuj laŭleĝe ne estas puneblaj. La vivo prezentas al ni grandan liberecon por „misfarado”, sen ke ni enkontaktiĝas kun la Juĝisto. Vere, miskonduto en ĉiaj formoj estas tolerata, escepte en tiu formo, pri kiu diras la kriminala kodo, ke ĝi estas malpermesita: korpa murdo estas punata, eĉ per puno dumviva, sed vi certe

samopinias kun mi, ke la nombro da „spiritaj murdoj” en la mondo miloble superas la nombron da korpaj murdoj. Oni povas sendanĝere spirite murdi kun-homon kaj tamen esti de multaj ŝatata homo en ĉi tiu socio. Sed je difinita punkto la miskonduto de homo estas kvalifikata kiel krimo, ĉar ĝi fariĝas kontraŭa al la normaro en la kriminala kodo.

La respondo al la demando pri la fonoj de la krima konduto apartenas al la tereno de la krimologio. Estas la demando pri la antropologia fono: la klarigo de el la homo. Dum la antaŭa jarcento la unuan fojon oni metis ĉi tiun demandon en sistema maniero en la tagordon. Pristudante ĉi tiun problemon oni okupis sufiĉe ekstremajn starpunktojn.

Unuflanke staris la Itala aŭ Antropologia Skolo, kiu gvide de la fama krimologo el tiuj tagoj, *Cezaro Lombroso*, defendis la tezon, ke la homo venas al krima konduto sur bazo de sia mensa kaj korpa stato. Laŭ tiu teorio, krima konduto estus la sekvo de la interna strukturo (antaŭkapablo, talentaro, naturdotaro) de la homo. Oni parolis pri „la denaska krimulo”. La homo, kiu sur bazo de certaj difektoj en sia interna strukturo, estus kvazaŭe antaŭdisponita por enkonfliktiĝi kun la socio.

Kontraŭ la Itala Skolo staris la Franca Medio-Skolo, kiu aŭdigas tute alian sonon. Ĝi eliras de la pli sociologie fundita teorio, ke estas la socio mem, kiu estas la kaŭzo de la fakto, ke homoj venas al miskonduto kaj krimo. La konfrontado kun la mondo povas alporti tiom da internaj difektoj al kreskanta infano, ke tiu ne plu kapablas plenumi la postulojn de la socio. *La Cassaigne* iam diris: „La socio havas la krimulojn, kiujn ĝi meritas”. Karakteriza ankaŭ estas la parolo de *Quetelet*: „La socio preparas la krimojn, la krimulo ilin faras”. Jen sociologia alproksimiĝo de la problemo. Laŭ ĉi tiu teorio do ne estas unualoke la interna strukturo de la homo, sed la renkontiĝo inter tiu homo kaj lia medio, kiu povas rezultigi la fakton, ke li venas al ĉiaj formoj de miskonduto.

Ĉi tiuj du teorioj do staris unu kontraŭ la alia. En la nuna tempo oni venis al la kompreno, ke káj la interna strukturo káj la medio estas decidaj por la formado de la homo, ĉar tiuj estas du aspektoj de la unu homa ekzistado. La renkontiĝo kun la vivo mem estas ege grava por la demando, kiel la ebloj, nedisigeble ligitaj al la homo, evoluos, sed same gravaj estas la ebloj denaskaj. Alivorte, la familio, en kiu la infano kreskas, ofte decidas kia ĉi tiu infano fariĝos. Sed la infano siaparte kun sia speciala mensa kaj korpa stato same havas fortan influon sur la sfero en la familio. La homo spertas ne nur la influon de sia medio, sed mem kunhelpas krei tiun medion per sia karaktera strukturo. Do ekzistas daŭra interinfluo.

Ni nun vidu, en kia grado la mensa kaj korpa stato de la homo havas signifon por lia homiĝo. La korpa, spirita kaj intelekta pakaĵo, kun kiu oni venas en la mondon, efektive havas grandan influon por determini kia kaj kio oni fariĝos. Ĉe tio korpo kaj spirito estas same gravaj. Ni estas homoj kaj tio signifas, ke korpo kaj spirito formas iun tuton kaj ne estas disigeblaj.

Iun nokton mi sidis hejme en la loĝoĉambro kun ardanta inflamo en la radiko de unu el miaj vangodentoj. Tiun nokton mi estis nur radiko; la spirito estis cedinta. La korpo fakte ja estas ege grava! Vi legu la libron de *Graham Greene*: „A gun for sale” (Pafilo aĉetebla). En tiu libro oni konatiĝas kun abomeninda krimulo. Sed evidentiĝas al ni, kiel tiu viro fariĝis tia. Li naskiĝis kun malbelega leporlipo kaj de sia plej frua juneco li spertis en sia vivo, ke en la renkontiĝo kun la kunhomo tiu alia ektimis, montris por li antipation, aŭ (kio estis ankoraŭ multe pli malbona) havis kompaton al li. Kaj tio povas rezultigi, ke infano

eksentas sin alia ol la aliaj, sin sentas ne akceptata, ekstersocieta, soleca. Tio ne signifas, ke iu, kiu naskiĝas kun korpa difekto, do devos fariĝi krimulo! Tiam ni turnas la tezon. Sed ke certaj korpaj mankoj, se la ĉirkaŭaĵo malbone reagis je tio, la homon ankaŭ psike povas mordeti, tio estas ekster diskuto. Ĉar korpaj difektoj, se ili ne estas bone direktataj, povas kaŭzi peliĝadon en la solecon, tiel ke oni sentas sin neakceptata. Ili, sekve, povas konduki al kontraŭsocia, eventuale krima konduto. Tio ne necesas, sed eblas. Se tio validas pri la korpo, tio certe ankaŭ validas pri la intelekto. Kaj nepre en nia okcident-eŭropa kulturo, kie ni ankoraŭ ĉiam tro forte kredas en la intelekto! Tio estas heredaĵo el la antaŭa jarcento, kiam oni vivadis en stato de optimismo rilate al tio multa, kion la homo kapablas fari. Oni tiam diris: „Konstruu lernejojn kaj oni povas fermi la malliberejojn!” Ek de tiu tempo forte kreskis la nombro da lernejoj, sed la malliberejoj ankoraŭ ĉiam ne estas fermitaj. La homa racio... ĝi ja kapablas al tio!! Kaj estas preskaŭ neimagebla tio, kion la scienco kaj la tekniko atingis. Ni nun venis eĉ al tio, ke — se ni volas — ni povas detrui parton de la kreaĵaro. Sed *Alberto Schweitzer* diris: „La homo, kiu en sia scienca teknika evoluo kreis eblojn, pri kiuj oni antaŭe neniam revis, forgesis unu aferon, nome: interne kunkreski kun siaj propraj intelektaj ebloj”.

La grava demando estas: kion ni faras per la ebloj, kiujn ni mem kreis? Kiel ni spirite kaj psike manipulas tion, kion ni intelektu efektivigas? Rezulto de la tro-taksado de la racio estas, ke la lerneja instruado, miaopinie, tro intelektualisme estas direktata. Konsekvence estas multaj infanoj, kiuj ne povas sekvi la programon, infanoj apartenantaj al la malmult-talentuloj. Kaj en multaj kazoj la gepatroj lasas tian infanon plu penadi en la klaso. Kompreneble ĝi bezonas pli da tempo por tio ol la aliaj. Sed oni ne demandas al si, kian „krucvojon” tio signifas por tia infano. La preteco por agnoski la malmult-talentecon de propra infano dependas de la amo gepatra. Se patro kaj patrino kuraĝas agnoski kaj akcepti, ke ili havas malmult-talentan infanon, ili montras grandan amon. Gepatra amo tamen ofte estas nenio alia ol simia amo aŭ gepatra instinkto. Gepatra instinkto apartenas al la besta nivelo, amo al la homa nivelo. Kiu havas la moralan kuraĝon por diri: „Jen, tiu mia infano ne povas tiel lerni kiel aliaj, kaj nun mi devas adapti miajn postulojn al tiu infano al ĝiaj ebloj”? Tia sinteno kreas la eblon, ke ankaŭ intelektu malmult-talenta homo certe povas laŭvalore vivi en ĉi tiu mondo. Sed nenombreblaj estas tiuj, kiuj simple pro gepatra egoismo ek de sia juneco estas pelataj en tiun konfliktsituacion, ke al ili estas farataj postuloj, kiujn ili neniam povos plenumi. Ili sentas sin aliaj ol la aliaj, komprenas ke ili ne estas plenkapablaj. Tio kondukas al ĉiaj sentoj de malsupereco.

Finfine estas homoj, kiuj naskiĝas kun psikaj difektoj. Homoj, kiuj suferas sub granda malriĉo de sento. Estas la homoj, kiuj estas tiel direktitaj al si mem, ke ili en sia vivo neniam povas renkonti la alian. La ligiteco al la kunhomo estas nekonata. Tiu alia ankaŭ ne povas esti vidata kiel iu, kiun oni devas atenti. Se iu eniras la vivon kun gravaj psikaj difektoj, la ŝanco al malsukceso estas granda. Kaj kutime estas malfacile restigi tian infanon en familio, ĉar la infano ne saniĝas kaj la familio ofte pereas.

(daŭrigota)

ROMO VOKAS VIN

Ĉu vi jam ensendis vian aliĝilon?

LA EKLEZIO EN LA MONDO

LA EKUMENO - I

Pri la ekumeno antaŭ nelonge aperis nederlandlingve klariga pristudo de *D-ro W. H. van de Pol*, profesoro de la katolika universitato de Nijmegen (*Dr. W. H. van de Pol: De Oecumene, Roermond 1961, Nederlando*). Aparteninte al diversaj protestantaj eklezioj la aŭtoro poste estiĝis katolika sacerdoto. Dum kelkaj jaroj li profunde okupis sin pri la ekumeno kaj ĝia problemaro, kaj akiris pro tiu studo kaj el propra vivsperto bonan kaj nuancitan koncepton pri ĝi. Ni pritraktos la plej gravajn aspektojn de la ekumeno priskribita en tiu ĉi por ĉiu kristano interesa libro, en kiu la aŭtoro celas al ordigo de la „ekumena trafiko”.

RENOVIGA KRISTANECO ESTAS NECESA. En la enkonduko *prof. Van de Pol* akcentas, ke ni en la hodiaŭa mondo, kun ĝiaj grandegaj ŝanĝoj sur ĉiu tereno de la homa vivo, ŝajnas stari antaŭ la elekto: neniu kristaneco aŭ radikale renoviĝonta kristaneco. Ĉie manifestiĝis signoj de nova estonto sur religia kaj eklezia terenoj. *Prof. Van de Pol* konstatas:

„La inklino al plibonigo, pliprofundigo kaj renovigo montriĝas en ĉiaspecaj formoj inter la kristanoj de la tuta mondo. Ni ĉe tio devas pensi ne pri unu certa eklezio, ĉikaze la eklezio, al kiu ni mem apartenas. Eĉ se ni kaŭze de nia kredkonvinko estus rigardantaj la propran eklezion kiel la unikan eklezion en la vera kaj plena signifo de la vorto, eĉ tiam ni devos konsenti, ke en la mondo estas milionoj da homoj, kiuj — kvankam ili „ne estas de ĉi tiu stalo” — kredas sincere en Kristo kaj agnoskas Kriston kiel la Sinjoron.

Ni estas malkovrintaj, ke ĉiuj kristanoj en la tuta mondo kune havis reciprokajn rilatojn kaj interesojn en plenmistera destina interligeco kaj en komuna vokinklino. Kio okazas en nia tempo sur la tero kaj petas pri renoviĝo en la eklezia kaj religia vivo, koncernas nin kiel kristanojn ĉiuj komune.” (p. 10-11)

Tiu granda komuneco, kiu ampleksas ĉiujn kristanojn sendistinge, povas kunlabori al la ekumeno, kiu en tiu ĉi jarcento okupis sin pri 4 grandaj zorgoj:

- 1-a la renovigo de la Eklezio.
- 2-a la rebonigo de la kristana unueco.
- 3-a la prediko de la Evangelio al ĉiuj homoj.
- 4-a la akcelo kaj certigo de la mondpaco.

SIGNIFO DE LA VORTO „EKUMENO”. La adjektivo „ekumena” devenas el la malnova-greka vorto „oikoumene”, signifanta „mondĉirkaŭprenanta”. En la eklezia paroluzo de la unuaj jarcentoj ĝi havis la signifon „havanta rilaton al la tuta Eklezio en la tuta Mondo” (ekz. la ekumenaj konciloj). Nuntempe la vorto ankaŭ havas novan signifon rilate al la ekumena movado, la movado por la rebonigo de kristana unueco kaj kunlaboro. Supraĵe vidite „ekumeno” ŝajnas havi la saman signifon kiel „kristanaro”. Tamen estas granda diferenco: „kristanaro” estas malmulte diranta kolektiva vorto esprimanta, ke oni parolas pri ĉiuj specoj de kristanoj, kvankam ili en la praktiko apenaŭ havis ion similan; „ekumeno” kontraŭe akcentas la aspekton de unueco kaj reciproka komuneco en la kristanaro. Tiel vidate la vorto „ekumeno” povas esti uzata de ĉiuj kristanoj en la sama signifo.

MALKONKORDO. Sed la ekumeno staras en la praktiko ĉiam inter sia fundamenta unueco kaj sia fakta malkonkordo. Pri tio *prof. Van de Pol* diras:

„La eklezia malkonkordo estas nur simptomo de multe pli grava malbono. Ĝi

radikiĝas fine en manko de amo. Ŝajnas, ke la intelekta atento por la vero forigis la amon. La amo ne estis sufiĉe granda por komune solvi la formiĝintajn kred-problemojn. La *furor theologicus* senkatenigis pasiojn de malamo kaj venĝemo. Kristanoj serĉis helpon en ŝtiparo, senkapigo, arestado kaj ekzilo por devigi al la kunkristanoj, ke ili konfesu „la veran kredon”. Per tio ne estas dirata, ke la peto pri la vero ne estas grava, sed, ke ni ne serĉis la veron en amo.” (p.22) La hodiaŭa malkonkordo devenas precipe de du disiĝoj: unue la disiĝo inter la Eklezio en komuneco kun la episkopo de Romo kaj tiu en komuneco kun la episkopo de Konstantinoplo, kaj due la disiĝo inter la Eklezio de Romo kaj la eklezioj formiĝintaj dum la 16-a jarcenta Reformacio. Oni distingas tri ĉef-tipojn inter la protestantaj eklezioj de la 16-a jarcento: la luterana, la kalvinana kaj la anglikana. Krom tio ankaŭ jam kreskis en tiu unua periodo kvara, pli malpli neeklezia tipo, el kiu poste devenis precipe en Anglujo kaj Ameriko la „liberaj” eklezioj aŭ frataroj. De la 17-a ĝis la 19-a jarcento ĉi tiuj kvar ĉef-tipoj de protestantismo havis izolitan ekziston kvankam kun reciprokaj polemikoj. Pro la penetrado de la klerigo en la 18-a kaj la liberalismo en la 19-a jarcentoj la ankoraŭ restanta uniformeco tute finiĝis. La malkonkordo de la kristanaro havis en la komenco de nia jarcento katastrofan amplekson.

EKUMENA KONSCIO. Tiam en la historio de 20 jarcentoj de kristaneco aperis io esence nova: la vekigo de la ekumena konscio. Tio ĉi enhavas, ke oni estas konscianta, ke malkonkordo en kredo kaj eklezia divideco inter la kristanoj, kiuj ĉiuj kredas en Kristo kaj estas baptitaj en Lia Nomo, estas en evidenta kontraŭo al la esenca intenco de Kristo kaj al la destino de la Eklezio... Tial oni volas celi al la kompleta renoviĝo de la *videbla* unueco kaj komuneco de ĉiuj kristanoj kaj de ĉiuj eklezioj. La malkonkordo en la kristanaro estas komuna kulpo antaŭ Dio. En ĉiam pli granda rondo kreskas la konscio, ke nura racionalisma kreddefendo estas pruvo de religia malriĉo. La kono de Dio kaj de la vorto de Dio ne estas nur afero de la intelekto, sed afero de la tuta homo t.e. de koro, konscienco kaj intelekto; ĝi ne estas afero de malvarma objektiveco, sed de varma, vera kaj amplena malfermeco.

Unua kondiĉo por ekumena pensado estas, ke ĉi tiu pensado estu reale la frukto de sincera kaj persone travivita konscio, ĉar foje okazas ke oni ekumene parolas, sed ne sukcesis agi tiel. Plie oni sciu kiel eble plej multe pri la teologia pensado kaj la ekleziaj okazoj en la tuta mondo. Tria kondiĉo estas kiel eble plej multa persona kontakto kun la vivo de aliaj eklezioj. Necesas ekkono de la liturgio de eklezio kaj respektplena atento por ĝi, ĉar:

„Ĉiu eklezio atestas pri la Rivelado de Kristo. Ĉiu eklezio estas konvinkita ke ĝi havas la plej puran, veran kaj kompletan konon de la Rivelado kaj, ke ĝi instuas kaj respondas la Rivelon de Dio en konsento kun la volo kaj intenco de Kristo. Normale ĉiuj kristanoj tra la tuta mondo estas *bonintencaj* kristanoj.” (p. 45).

(daŭrigota)

ATENTU!!

Registritaj leteroj, pakajoj, kaj ĝenerale ĉiuj poŝtaĵoj tro grandaj por la fendo de ordinara poŝtkesto, destinitaj al Redakcio aŭ Administracio, t.e. Centra Oficejo en Dordrecht, estu adresataj jene: F-ino T. Durenkamp, Heemraads-singel 147, Rotterdam-6, Nederlando.

Auxilia

Caritas Christi urget nos

Ĉu mi povas prezenti al vi AUXILIA, modernan katolikan esprimon de la „Caritas”? Estas internacia asocio por helpo al malsanuloj kaj handikapitoj. La ilo: senpaga instruado per leteroj.

Ĉu vi scias kiel longe daŭras por malsanuloj la monotona tempo, dum kiu ili nenion povas fari? Franca malsanulino, kiu spertis tion mem, volis havigi agrablan kaj utilan okupadon al la malsanuloj kaj fondis en 1926 AUXILIA. Kaj la amo transpasis la limojn: en 1935 Auxilia eniris Belgujon, en 1952 Hispanujon, en 1955 Italujon kaj en 1959 Luksemburgon (kiu tamen jam antaŭe kunlaboris kun la belga sekcio).

La unua celo de AUXILIA estas instrui. La profesoro regule sendas lecionon al sia lernanto, kiu studas tiun ĉi kaj resendas la taskon. Vi eble demandas kion oni tiel instruas? Ĉion, se oni havas la taŭgajn instruistojn, sed ofte ties nombro ne sufiĉas. La lingvoj (ankaŭ Esperanto) kaj la teknikaj fakoj estas inter la plej demandataj. Multaj personoj, kiuj pro malsano ne povis regule ĉeesti la lernejon, nun kapablas legi, skribi, kalkuli... Malsanaj junuloj estas helpataj daŭrigi la interrompitan studon... Por aliaj estas necese readaptiĝi post akcidento, ili lernas novan profesion... Ĉio per la helpo de AUXILIA.

Kiuj do povas peti kursojn? Ĉiuj malsanuloj aŭ handikapitoj, hejme aŭ en kliniko aŭ sanatorio, de kiu ajn opinio, religio, aĝo aŭ sociala klaso ili estas. En Italujo oni krome donas kursojn al malliberigitoj, ili ankaŭ bezonas helpon kaj komprenon, ili ankaŭ volas la kontakton kun la komuneco.

Kaj la instruistoj? Ili bezonas grandan koron kaj bonan konon de la fako por instrui ĝin per la helpo de libro aŭ tajpita kurso. Diplomo de instruist(in)o ne estas necesa. Inter la instruistoj ni havas arkitektojn, oficist(in)ojn, laborantojn, inĝenierojn, k.t.p. Ĉiuj konscias pri la valoro de la vorto de Kristo: „Kion vi faris al la plej simpla, vi faris al Mi!”

Per la lecionoj, AUXILIA ne nur helpas al la materia sed ankaŭ al la psikologia kaj morala readaptiĝo de la malsanulo. Tiu ĉi spertas, ke eĉ en nia epoko oni havas neprofiteman atenton por li. Li estas liberigata el la deprimanta atmosfero de izoliteco, li forgesas sian doloron, direktante sian atenton al la lecionoj, kaj tiel pli rapide resaniĝos. La personaro de la sanatorioj kaj la kuracistoj kiuj konas AUXILIA aprezas la bonan influon de tiuj kontaktoj sur la pacientojn, kaj ofte volonte kunlaboras.

Se la malsanulo profitas de la kursoj, la profesoro lernas de la lernanto, kiu ofte studas en tre malfacilaj cirkonstancoj, (ekz. kuŝanta la tutan tagon), kio signifas paciencon, energion kaj persiston.

En la diversaj landoj ni havas entute 5.000 gelernantojn kaj 3.500 instruistojn. Ni nepre devas disvastiĝi. En ĉiuj landoj, malfeliĉuloj atendas helpantan manon, por protekti ilin de la indiferenteco kaj de la fatalismo. Ni devas helpi... AUXILIA devus aperi en ĉiu lando de I.K.U.E.

Al ĉiuj, sanuloj kaj malsanuloj, mi volonte donos pluajn informojn. Se vi loĝas en unu el la menciitaj landoj kie Auxilia jam ekzistas, mi donos al vi la adreson de la sekretario. Se Auxilia ne jam ekzistas en via lando, vi eble povos helpi al la fondo (se vi eventuale konas similan katolikan organismon, kun kiu Auxilia povus kontakti, mi petas la adreson). Mi atendas multajn leterojn kun entuziasmaj proponoj.



ALVOKO DE LA PAPA AL UNUECO

Nova encikliko pri la unueco de la Eklezio ĉirkaŭ la Seĝo de Petro.

En sia nova encikliko „*Aeterna Dei Sapientia*” (la eterna saĝeco de Dio), verkita je la 1500-a datreveno de la morto de papo *Leono la Granda*, papo *Johano* denove alvokas la kristanaron al unueco. Kiel en *Leono I*, la „Instruanto de la eklezia unueco”, ankaŭ en ni vivas la granda sopiro, ke ĉiuj popoloj iru la vojon de la vero, amo kaj paco, skribas la papo. Por pli bone prepari la Eklezion por ĉi tiu alta mesaĝo, li daŭrigas, ni kunvokis la Duan Vatikanan Koncilon, fidante, ke la kunvenantaj episkopoj de la Eklezio ne nur plifortigos la unuecajn ligojn de la kredo, diservo kaj konduko, sed ankaŭ direktos sian atenton al la multnombraj homoj, kiuj ne apartenas al tiu ĉi Eklezio, sed tamen kredas en Kristo. La Koncilo invitu ilin ĉiujn sin ordigi ĉirkaŭ la alta Paŝtisto de la grego. Ili ĉiuj ja estas konfeditaj al la gardo kaj zorgo de Petro kaj liaj posteuloj. La unueco de la Eklezio havas sian komencon kompreneble en Kristo, kun Kiu ĉiu kredanto estas ligita precipe en la Sankta Eŭĥaristio. Sed centro kaj apogo de la kiel hierarĥia komuneco fondita Eklezio estas la episkopo de Romo, la posteulo de Sankta Petro kaj tial anstataŭanto de Kristo mem. En tiu encikliko de decembro 1961 papo Johano akcentis tion, kio mankas al la Mondkonsilantaro: unueco de la kristanoj kaj primateco de la papo.

DIO BENU

Dio benu viajn blankajn manojn,
kiuj amkaresis min —
briligu Dio viajn varmajn lipojn,
kiuj lacan ripozigis min...

Mi al inoj plu ne kredis,
mensogojn konis koro mia nur —
mi vin serĉis, mi vin trovis,
kiam morti mi deziris jam...

Dio benu viajn blankajn manojn,
kiuj tra krucvojojn zorge gvidis min —
mi feliĉon vane longe serĉis,
kun vi mi trovis ĉion nun...

AL MONDO PAROLU

Iam feliĉa volis vi esti,
iam feliĉon atendis de mi vi.
sed eble en mi vi trompiĝis...

Ne konis vi homajn animojn,
vi kredis al ĉiuj — al mi,
ĉiuj al vi nur mensogis,
neniam mensogis al vi mi —

eĉ ne dum noktoj malhelaj,
kiam pasioj ventegaj
en koro kriegis je vi...

DAMJAN VAHEN — SVETINOV — Jugoslavio

Kaj eĉ se vi ne volas kunlabori rekte, vi eble havas interesan aktualan libron aŭ kelkajn poŝtmarkojn de via lando, kiuj estas ĉiam bonvenaj ĉe la malsanuloj kiel tempopasigo. La libroj povas esti verkitaĵoj en nederlanda, franca, germana, angla, itala, hispana aŭ esperanta lingvoj!

Nome de la malsanuloj mi kore dankas vin antaŭe.

*F-ino Els BUYSSSE,
Te Nijverdoncklaan 51,
EDEGEM-ELSDONK, Belgujo.*

La £ 1.000.000 banknoto

De Mark Twain-II

Ho, kiel mi manĝis! Kiam fine mi sentis min satega, mi elpoŝigis mian monon, disfaldis ĝin kaj ekrigardante ĝin mi preskaŭ svenis. Kvin milionoj da dolaroj! Ho, mi kapturiniĝis.

Mi certe sidis tie pli ol unu minuton, mirigita kaj fiksrigardanta la banknoton antaŭ ol mia cerbo ree funkciis. La estro estis la unua kiun mi tiam ekrimarkis. Lia rigardo estis fiksita sur la banknoto kaj li estis kvazaŭ ŝtoniĝinta. Liaj tuta korpo kaj animo respegulis respektigon, sed li aspektis kvazaŭ li ne povus movi manon aŭ piedon. Mi tuj determinis tion, kio estu farenda kaj mi faris la nuran prudentan agon kiu estis farota. Mi transdonis la noton al li kaj diris indifere: „Bonvolu ŝanĝi, mi petas.”

Tiam li denove sin regis kaj senkulpigis sin multfoje pro tio ke li ne povas ŝanĝi ĝin, kaj mi eĉ ne povis persvadi lin ĝin tuŝi. Li volis rigardi ĝin, rigardadi ĝin. Ŝajne li ne povis kontentigi la soifon de siaj okuloj, sed li ne kuraĝis tuŝi ĝin kvazaŭ ĝi estus io tro sankta por ordinarulo. Mi diris:

„Mi bedaŭras se tio estas malkonvena por vi, sed mi devas insisti. Bonvolu ŝanĝi, mi havas nenion alian.” Sed li diris ke ne estas grave; li volonte volas lasi la bagatelaĵon ĝis sekvonta fojo. Mi diris ke mi eble ne estos en la ĉirkaŭaĵo dum iom da tempo; sed li respondis, ke tio estas sensignifa, li povas atendi, kaj cetere mi povas akiri ĉion laŭ mia deziro, kiam ajn, kaj ke mi povas pagi kiam plaĉas al mi. Li daŭrigis ke li ne timas fidi riĉan ĝentilhomon kiam mi, malgraŭ ke mi estas gajhumora kaj volas mistifiki la publikon per miaj vestaĵoj. Tiun momenton alia kliento envenis kaj la estro gestis al mi ke mi forigu la monstraĵon; poste li, kliniĝante, kondukis min al la pordo kaj mi rekte iris al la domo de la du fratoj por korekti ilian eraron antaŭ ol la polico persekutus min kaj devigus min fari tion. Mi estis sufiĉe nerva, fakte tre timigita, kvankam kompreneble mi neniel estis kulpa. Sed mi bone konis la homojn por scii ke ili, rimarkinte ke ili donis milionpundan noton al vagabondo en la supozo ke ĝi estas unupunda, furiozigas kontraŭ li, anstataŭ kvereli kun sia propra senzorgemo, kiel decus.

Kiam mi alproksimiĝis la domon mia incitiĝo komencis forflui, ĉar ĉio estis kvieta tie, kaj tio certigis al mi, ke la erarego ankoraŭ ne estis malkovrita. Mi sonorigis. La sama lakeo aperis. Mi informiĝis pri la du sinjoroj.

„Ili estas for”. Tia estas la desupra, malagrabra maniero de tiu homspeco.

„Ĉu for? Kien?”

„Vojaĝe.”

„Sed kien?”

„Al la kontinento, mi supozas.”

„Ĉu al la kontinento?”

„Jes, sinjoro.”

„Kiamaniere? Laŭ kiu vojo?”

„Mi ne scias, sinjoro.”

„Kiam ili revenos?”

„Post unu monato, ili diris.”

„Post unu monato! Tio estas terura. Bonvolu indiki kiamaniere mi povas interkontaktiĝi kun ili. Estas treege urĝe.”

„Vere, mi ne povas. Mi tute ne scias kien ili iris, sinjoro.

„Tiuokaze mi volas paroli kun parenco.”

„Ankaŭ la parencoj estas for. Jam monatojn eksterlande... En Egiptujo aŭ Hindujo, mi pensas.”

„Sed grandega eraro estas farita. Ili certe revenos antaŭ vesperiĝo. Bonvolu diri al ili ke mi estis ĉi tie, kaj ke mi revenos ĝis kiam ĉio ordiĝos, kaj ke ili ne timu.”

„Mi informos ilin, se ili revenos, sed mi ne atendas ilin. Ili diris ke vi estos ĉi tie en malpli ol unu horo por informiĝi, sed ke mi devas diri al vi ke ĉio estas en ordo; ili estos ĉi tie ĝustatempe kaj atendos vin.”

Mi do devis cedi kaj foriri. Kia situacio! Mia cerbo estis vaporiĝonta. Ili estos ĉi tie „ĝustatempe”. Kion tio povus signifi? Ho, la letero eble donos klarigon. Mi estis forgesinta la leteron; mi elpoŝigis kaj legis ĝin. Jen la enhavo:

„Vi estas inteligenta kaj honesta viro, tion montras via vizaĝo. Ni konjektas vin malriĉa kaj fremdulo. En la koverto troviĝas monsumo. Ni pruntos ĝin al vi por tridek tagoj, sen rentumo. Anoncu vin en ĉi tiu domo je la fino de tiu periodo. Mi vetis per vi. Se mi gajnos vi havos ĉian oficon kian mi povos doni, ĉian, tio signifas, al kiu vi montriĝas esti alkiutimiĝinta kaj kiun vi kapablas plenumi.”

Sen subskribo, neniuj adresoj. Sen iu dato.

Jen kia ĥaoso! Kutime oni scias, kio antaŭe okazis, sed ne mi! Al mi ĝi estis profunde malklara problemo. Mi havis neniun komprenon pri la ludo, nek ĉu iu volas esti malica aŭ agrabla je mi. Mi eniris parkon kaj sidiĝis por klopodi solvi ĝin kaj konsideri kio estas plej bone farenda. Post unu horo mia pripensado kristaliĝis en jena opinio:

Povas esti ke tiuj viroj havas bonajn intencojn por mi, eble malbonajn. Neniuj decideblaj — do for kun ĝi. Ili havis ian ludon, aŭ planon aŭ iu ajn eksperimenton; neniuj manieroj por eltrovi tion — for kun ĝi. Ekzistas ia veto per mi; neeble eltrovi kian — for kun ĝi. Tio senigis min de la nedetermineblaj faktoroj; la cetero de la problemo estas sentebla kaj konkreta kaj povas esti klasifikata kaj determinata kun certeco. Se mi petas al la Banko de Anglujo deponi la banknoton en la konton de la viro al kiu ĝi apartenas, ili faros tion, ĉar ili konas lin, kvankam mi ne. Sed ili demandas, kiel mi akiris ĝin, kaj se mi diros la veron ili sendos min al frenezulejo, kompreneble, kaj mensogo enkarcerigos min. La sama rezulto sekvus se mi klopodus deponi la noton en iun ajn alian bankon, aŭ se mi prunteprenus monon per ĝi.

Vole nevole mi devas porti la imensan ŝarĝon sur mi, ĝis kiam la viroj revenos. Ĝi estas senvalora por mi, same senvalora kiel manpleno da cindro, kaj tamen mi devas prizorgi ĝin kaj gardi ĝin, dum ke mi almozpetas por mia vivsubteno. Mi ne povos fordoni ĝin se mi klopodus. Ĉar nek honesta civitano nek rabisto akceptus ĝin aŭ volus havi ian rilaton kun ĝi. Tiuj fratoj ne riskis ion. Eĉ se mi perdus la noton aŭ forbruligus ĝin, ili ne malhavirus ion, ĉar ili povus malpermesi la pagon kaj la banko kompensus ilin; sed intertempe mi havus monaton da suferado sen salajro aŭ profito... Se nur mi helpu gajni la veton, kiu ajn ĝi estu, kaj akiru tiun oficon promesitan al mi. Mi volonte havus tiun oficon; tiaj homoj povas fordoni oficojn kiuj estas allogaj...

Mi komencis profunde pensi pri tiu ofico. Mia espero pligrandiĝis. Sendube la salajro estos bonega. Ĝi komenciĝus post unu monato. Post tio ĉio estus en ordo.

Jam baldaŭ mi sentis min en supera stato. Intertempe mi denove vagis tra la

stratoj. Vidante tajlorejon mi sentis fortan sopiron forĵeti miajn ĉifonojn kaj ree vesti min dece. Ĉu mi povos pagi tion? Ne, en la tuta mondo mi posedis nenion krom milionon da pundoj. Tial mi devigis min preterpasi. Sed baldaŭ mi kvazaŭ magnete reiris. Kruele la tento persekutis min. Mi preskaŭ certe estis preteririnta la butikon pli ol ses fojojn dum tiu porvira batalo. Finfine mi cedis; mi simple devis. Mi demandis ĉu ili hazarde havas ian malbonforman kostumon. La ulo al kiu mi parolis kapgestis al alia, sed ne respondis. Mi iris al la indikito kaj siavice li gestis per la kapo al alia, senparole. Mi direktis min al li, kaj li diris:

„Momenton!”

Daŭrigota.



64. En *R. K. Artsenblad*, ned. = katolika kuracista revuo, aŭg. 1960 troviĝas priparolado de *d-ro J. E. Schulte* pri la internacia kongreso por katolikaj kuracistoj en *Munkeno* 1960. Ni legas; „De aliaj (ol la klare parolantaj oratoroj) malhelpis la encirkvitigita traduk-aparaturaro. Ĉirilate mi diru, ke kiel en *Scheveningen* kaj aliloke, ĉiuj paroladoj samtempe tradukitaj estas elsendataj kaj aŭdeblaj, kelkaj eĉ sen ke la ĉicele aktivaj personoj disponas pri la teksto; ega laboro! Sed la tekniko ankaŭ ĉi-rilate restas nur kompletigo, surogato; nenio superas la rektan aŭskultadon de bone prononcita parolado. Nia teknika epoko do ankaŭ je tio ne povas nin ĉiuparte kontentigi, eĉ malgraŭ plenerita laŭdo por la interpretistoj.”

65. *Aŝrikaj malfacilaĵoj*. A. El letero de katolika misiisto *Eygenraam* en *Butebo, Mbale-Uganda* gazetisto de N.D.C. = gazeto en Dordrecht, Ned. 30.12.'61 elĉerpis i.a.: La paroladoj tie fariĝas en du lingvoj; unu el tiuj scipovas la misi-patro, la alia kreas malfacilaĵon. La prediko ĉiun dimanĉon estis tradukata kaj de la katedro prelegata de instruisto. Oni konfesas per listeto! Sed: al ĉio oni ja kutimiĝas. -(komp.n. 55).

66. *Aŝrikaj malfacilaĵoj*. B. *La murditaj italoj*. Ĉie en la gazetaro oni povis legi, ke la 19 italaj soldatoj de la armeo de la Unuiĝintaj Nacioj en *Kongolando* estas murditaj ĉar ili ne povis klarigi, ke ili ne estas belgoj sed italoj! Kaj la altranguloj obstinege daŭrigas la lingvan Babelon!

67. „*Eŭropo trilingviĝas*”. El la porfamilia germanlingva revuo „*Christliche Familie*”, n-ro 50/1961, aperis artikolo sub ĉi tiu titolo. El ĝi mi ĉerpas jenon: „Statistikistoj ĵus aperigis prikalkulojn, per kiuj la „eŭropa lingvo-kreskado” estas pruvata. Kiu post ĉirkaŭ 15 jaroj en mezgrada profesio volas konservi sian pozicion kaj progresi, devas perfekte regi en la okcidenteŭropaj landoj tri, pli bone kvar lingvojn. Tion profetas la lingvisto profesoro *Veith*. El liaj esploroj rezultas, ke Eŭropo jam ĉirkaŭ la jaro 1970 klare ekkonigos la tendencon al la trilingveco. Sed apud la angla, franca kaj germana lingvoj jam baldaŭ versaĵne kvara „neevitebla” akiros ĝeneralan aprobon ĝis en la skandinavaj landoj. La hispana kaj itala lingvoj supozeble kiel kvara lingvo egalvaloras, dum la slava lingvo-grupo rilate al ekonomia graveco en la okcidenta hemisfero antaŭvideble nur post 25 jaroj valoras pli. La profesia evoluo interligita kun ekonomia kaj administra interplekto postulas, kvazaŭ kiel devo de la nuna jardeko, klerigi en Eŭropo trilingvan, perfektan profesian generacion.”

68. *Usonaj turistoj en Anglujo.* La „*General Anzeiger der Stadt Wuppertal*” raportis 14.12.1961:

„*Woburn Abbey*”, la norde de Londono situanta kastelo de la duko de Bedford fariĝis granda logilo por fremduloj. Por klarigi la vidindaĵojn oni antaŭ nelonge disponigis magnetajn sonbendojn en kvin lingvoj. Je speciala deziro de la usonaj turistoj nun estas priparolata sesa sonbendo de usonano. La usonaj turistoj povis nome nur tre malfacile kompreni la anglalingvan sonbendon.”

69. *Ĉarmaj interpretistinoj.* La kongreso en Bruselo de la ministroj de la Eŭrofoiro kelkfoje similas cirkon, lingvan cirkon. Ĉar reciproke oni parolas nederlandlingve, france, itale, germane tra la kanaloj de la tradukado. Tio kreas la plej strangajn situaciojn.

La (ned.) ministro *Marijnen* povas grave kuntiri la brovojn kaj diri maldolĉaĵojn al sia franca kolego *Couve de Murville*. Sed por *Couve* la nederlanda registarano parolas per alta, ĉarma, fraŭlina voĉo. Li ja sidiĝas kun kaptelefono per kiu la simultana traduko glitas de afabla nederlanda interpretestino en vitran ŝranketon.

„Tio restas por ni plej malfacile” plendas la cetere tiel lertaj interpretistoj, „reprodukti ĉian ministran koleron, la indignitan voĉon, la tranĉantan tonon. Kiam la ministro De Pous ekkondutas mallume kaj minace ni havas la plej grandan malfacilaĵon.” (*Volkskrant, Ned., 22.12.61*)

Jen, karaj legantoj, ĉarma (?) kolekto en la komenco de la jaro 1962a. Sed al mi estus pli ĉarme se je la fino de ĉi tiu jaro mia rubriketo ne plu havos celon, ĉar tiu celo estas atingita: ĉiu parolas Esperanton! Mi certe kredas ke per tio mi estas la interpretisto de vi ĉiuj! Dume; mi ankoraŭ dankeme deziras al ĉiuj, antaŭ ĉio al la fidelaj kunlaborantoj la dian Benon por la nova jaro.

Ne forgesu sendi viajn interesaĵojn al

paroĥestro C. A. Ouwendijk, Rijpweterina, Nederlando

LA FILMO „JEN AŬSTRALIO”

La 16-mm, sonfilmo „Jen Aŭstralio” kun klarigo en Esperanto estas produktajo de la filmofako de la Aŭstralia Registaro. „Jen Aŭstralio”, same kiel la antaŭa filmo „Aŭstralio hodiaŭ”, estas en plena laŭnatura koloro kaj dauras 25 minutojn. Ĝi prezentas ĝeneralan bildon pri Aŭstralio, enhavante pejzaĝojn, florojn kaj bestojn, agrikulturon, la industriojn de paŝtado, fiŝkaptado, minado kaj fabrikado. Ĝi montras la sportojn kaj ankaŭ kulturajn aspektojn de Aŭstralio. Inter aliaj interesaj bildaroj estas edziĝfestoj de indiĝenoj en Nov-Gvineo, tendaro sur la antarkta kontinento kaj la transportado de virŝafoj kaj bovajo per aeroplanoj.

La komentarion esperantigis la Sidneja Esperanto-Klubo kaj S-ro *F. R. Banham*, redaktoro de *La Rondo/Australian Esperantist*. La parolanto estas S-ro *Ralph Harry*, prezidanto de *Aŭstralia Esperanto-Asocio*, kies voĉo estas jam konata al samideanoj en multaj landoj.

La Aŭstralia Registaro, por certigi bonordan dissendadon, prunte donos la filmon nur al landaj asocioj, kiuj devos ensendi la mendopeton al unu el la subaj adresoj:

The Australian News and Information Bureau, Australia House, The Strand, London. (organizoj en Eŭropo, Meza Oriento kaj Afriko).

The Australian News and Information Bureau, 636, 5th Avenue, New York 20, New York, U.S.A. (organizoj en Ameriko).

The Australian News and Information Bureau, Canberra, A.C.T. Australia (organizoj en Azio kaj Pacifikaj Landoj).

LA VIIa INTERNACIA FEST-SEMAJNO DE LA RELIGIA FILMO

estis aranĝata de 17-23 novembro 1961 en *Wien* de la *Katolika Film-komisiono por Aŭstrujo*, sub prezido de prelado kanoniko d-ro *Karl Rudolf*, sub la honora protekto de kardinalo ĉefepiskopo d-ro *Franz König*, *Wien*, episkopo d-ro *Stefan Laszlo* de la novfondita diocezo *Eisenstadt (Burgenland)*, samtempe „film-episkopo” de Aŭstrujo, de la episkopo evangelia d-ro *Gerhard May* kaj de la ministro por instruaferoj d-ro *Heinrich Drimmel*. Oni montris ree elstarajn religiajn filmverkojn, grandparte katolikajn sed ankaŭ evangeliajn kaj unu hindan; kelkaj el ili estis distingitaj de instancoj ŝtataj aŭ porfilmaj.

Enkonduke estis eklezia inaŭgura soleno „*Laudate Dominum*” en la katedralo *Sta. Stefano*; parolis ĉefepiskopo d-ro *Franz Jachym*.

Unue oni prezentis filmon usonan, sed germanlingvan: „*Demando 7*” (montranta la tragikan sorton de protestanta pastoro kuraĝa, firmkonvinka, sekve de kontraŭeklezia resp. kontraŭreligia batalo en la nuna Orienta Germanujo). Ĝi gajnis la plej altan ŝtatan predikaton „*Speciale valora*” en Germanujo kaj Aŭstrujo.

Sekvis Franca filmo „*Bernadette de Lourdes*” en origina formo, pri vivo kaj morto de la modesta elektita knabino, monaĥino, sanktulino. Alia franca filmo estis „*La pastro Léon Morin*”. Ankaŭ en origina formo, filmo nefacilproblema el tempo lastmilita resp. postmilita. Ambaŭ filmoj estis nur franclingvaj, sen ali-lingvaj subtitoloj. Aktualiĝis tiukaze denove la lingva problemo, ĉar multaj vizitantoj ne regis la francan lingvon tiel funde kaj perfekte por povi sekvi kaj tuj plene kompreni la signifajn dialogojn.

Speciale interesa kaj valora, kvankam kompreneble por ni sufiĉe alispeca, nekutima estis la hinda filmo sed en germana lingvo „*Du okuloj — dekdu manoj*”, profunde tuŝanta, montranta la sinoferan venkon de idealulo, mallibereja vartisto, kaj lian sukceson per senperforta traktado de ses krimuloj. La filmo ĉe la Berlina film-festivalo estis distingita; per la „*Arĝenta urso*”.

Jam iam montrita evangelia sveda filmo, kvazaŭ transtempa, nun germanlingva: „*La Ĉielludo*” efikis iom strange, ne facile kompreneble, kvankam spirite religie, sed laŭ senco protestanta.

Germana filmo: „*Nigra haŭto kaj varmega tero*” estis dokumenta filmverko misia, farita en *Ruando (Aŝriko)* dum 1959 helpe de la misiistoj, la t.n. „*Blankaj patroj*” laŭ speciala deziro de la iama reĝo *Mutara Rudahigwa IIIa*, mortinta samjare.


Kontribuo de Aŭstrujo estis la filmo „*La miraklo de unu nokto*” pri la origino resp. estiĝo de la nun mondkonata kristnasko-kanto „*Stille Nacht, heilige Nacht*” (Paca nokt’, sankta nokt’) en pasinta jarcento (1818) en la Salzburga vilaĝo *Oberndorf ĉe la Salzach*. (vidu EK 1961, 216).

La efektive ĉarma laŭhistoria konciza filmverko estis ankaŭ prezentata en la televido dum la Kristnasko-nokto 1961. — En la kadro de menciita filmvespero oni ankaŭ gratulis al „filmprelato” d-ro Rudolf je lia 75jariĝo.

Lasta filmo montrita estis denove usona, en germana lingvo, pri „*Francisko de Asizo*”. Profundimpresa biografio pli malpli trafa de la unika sanktulo.

Antaŭ la menciitaj ĉefaj filmoj oni vidigis ĉiufoje po unu el signifaj valoraj kulturfilmoj i.a. pri religiaj verkoj de pentro-arto k.s. Aŭstrujo, Francujo, Germanujo, Portugalujo kaj Usono estis tiamaniere reprezentataj.

Post solena dimanĉa Di-servo en preĝejo de *Sta. Aŭgusteno* parolis en salonego de „*Albertina*” d-ro *Roman Herle*, redaktoro de la aŭstria katolika semajna



ESPERANTO EN LA GAZETARO

DIARIO REGIONAL, Valladolid, Hispanujo publikigis 15.12.61 trionpaĝan artikolon de „Kamy” sub la titolo „Ĝusta honorigo”, okaze de la granda artikolo en „Kuriero de la Unesko” pri la meritoj de D-ro Zamenhof kaj la utilo de Esperanto. *

EL NOTICIERO, Zaragoza, Hispanujo, publikigis en la monatoj novembro kaj decembro diversajn artikolojn kaj sciigojn pri nia movado:

7.11.61 — Sciigo pri la parolado de la fervora IKUE-ano *Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo*, honora Rektoro de la Universitato, pri la esprimado de la kvanto en Esperanto, dum la „IVa Kunveno Scienca-Filozofia”, en la kunsido aplikata al la „Terminologio de la Kvanto”.

29.11.61 — Artikolo pri la solena investo de D-ro Sancho Izquierdo kiel honora doktoro de la universitato de Bordeaux. (Alia eltranĉo, kiu ne portas la nomon de la koncerna gazeto, nek la daton, raportas pri la investo de D-ro Sancho Izquierdo kiel honora doktoro de la franca Universitato de Montpellier, je 3.12.61).

13.12.61 — Sciigo de la prelego de D-ro Sancho Izquierdo kun mencio de la temoj, okaze de la Zamenhof-tago.

16.12.61 — Duonpaĝa raporto pri la supremenciita „majstra” prelego.

21.12.61 — Raporto pri la inaŭguro de impona Esperanto-ekspozicio en Zaragoza.

22.12.61 — Fotoj pri tiu ekspozicio. *

NRZ WUPPERTAL, Germanujo enhavis 22.12.61 raporton pri la Zamenhof-festo de la regionaj esperantistoj, kun konciza enhavo de la prelego de eksrektoro W. Picard. *

LE MONDE DES PHILATELISTES, 5 rue des Italiens, Paris-IXe, impona monata revuo, publikigis en sia kajero de dec. 1961 nian artikolon pri la Sankta Krucsigno sur la bildo de poŝtmarkoj, (EK 1961, 118/119).

Ensendu al ni gazetojn aŭ eltraĉaĵojn (kun mencio de nomo kaj dato) enhavante artikolojn pri nia movado.

SOLVO DE LA ENIGMO, sur p. 224

I		II	I		II
par	d	oni	per	s	vadi
art	i	kolo	fon	t	ano
tur	b	ino	kame	n	tubo
band	e	rolo	mini	a	turo
cirko	n	stanco	kre	s	po
ĉap	i	tro	pres	k	aŭ
kas	t	oro	kon	f	uzi
karn	a	valo	piet	e	stalo
ĵur	n	alo	flu	s	tri
li	k	vidi	por	t	reto
pano	r	amo	part	o	preni
leg	i	timi	violo	n	ĉelo

kultur-revuo „Die Furche” (La sulko) pri la tre aktuala temo „La filmo fokusa spegulo de la tempo”. — Okazis krome akcepto de la film-profesiuloj (aktoroj, verkistoj, produktantoj k.c.) en la ĉefepiskopa palaco.

W. Mudrak, Wien.

GRAVA DECIDO DE LA POPOLUNIVERSITATOJ POR LA ESTONTECO DE ESPERANTO

Dum la IV-a Internacia Konferenco de la Popoluniversitatoj, estis akceptita la sekvanta decido:

La IV-a Konferenco de la Popoluniversitatoj kunveninta en Torino (Italujo) la 8, 9, 10-an de Septembro 1961, post detala ekzameno de la raporto farita de S-ro Barbiellini Amidei pri la demando pri internacia lingvo, konstatas:

1) ke Esperanto estas la sola lingvo instruata en la Popoluniversitatoj de diversaj landoj;

2) ke Esperanto estis praktike uzata dum la 4 Internaciaj konferencoj de la Popoluniversitatoj en Parizo (1957), Firenco (1958), Strasburgo (1960) kaj Torino (1961), kaj ke internaciaj kongresoj kun pluraj miloj da personoj uzas Esperanton kiel komunan lingvon;

Sekve, la Konferenco petas la Internacian Asocion de la Popoluniversitatoj:

a) Patronadi la koordinitajn kursojn de Esperanto organizitajn de la Popoluniversitato de Zurich en kunlaborado kun pluraj popoluniversitatoj de diversaj landoj;

b) organizi kunvenon-demonstracion en Romo en Julio 1962, kies partoprenontoj, po 3 el ĉiu interesita lando, estus lernintaj Esperanton inter Oktobro 1961 kaj Julio 1962;

c) komisii S-ron Claude Nedjar por la organizo de tiu kunveno, kies detalojn li devos sendi al ĉiuj interesitaj P.U. antaŭ Kristnasko 1961;

d) komisii lin fari raporton pri la rezulto de tiu kunvenodemonstracio por la V-a Konferenco de la Popoluniversitatoj, kiu alprenos utilajn konkludojn.

Tiuj konkludoj de la II-a Komisiono de la Konferenco estas unuanime akceptitaj de la pleno de la IV-a Konferenco.

KOMENTA LETERO DE D-ro IVO LAPENNA:

La 20-an de novembro 1961

S-ro Pierre Petit, honorofica prezidanto de la Internacia Asocio de Popoluniversitatoj kaj komitatano de UEA, informis min pri la grava rezolucio, akceptita de la IV-a Internacia Konferenco de Popoluniversitatoj, okazinta en Torino de la 8-10 de septembro 1961. La tekston de tiu rezolucio vi jam povis legi en la Esperanto-gazetaro, sed mi ankaŭ aldonas ĝin sub A).

Kiel vi vidas el la rezolucio, nun estas planata kunvenodemonstracio por gejunuloj en Romo kaj la preparlaboroj jam bone progresas. Laŭ la peto de U.E.F., mi informis pri la afero ankaŭ la Sekretariaton de UNESKO, kun kiu plue rekte rilatos la komisiito por la organizo de la kunveno, s-ro Claude Nedjar. La celo de la kunveno estas kontaktigi gejunulojn de diversaj landoj, ebligi interŝanĝojn de ideoj, okazigi diversajn kulturajn aranĝojn inkluzive vizitojn al antikvaĵoj, muzeoj, artgalerioj kaj aliaj kulturaj monumentoj kaj vidindaĵoj de Romo.

Laŭ la informo de s-ro Petit, U.E.F. jam faris ĉion necesan por sukcesigi la aferon en Francujo, sed li tute prave atentigas, ke necesas entrepreni adekvatajn paŝojn en aliaj landoj, por ke la afero plene sukcesu kaj fariĝu plia brila manifestacio de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo. Tial mi turnas min al vi kun la peto tuj komisii iun kompetentan personon, kiu okupiĝu pri la organizo de la afero en via lando kaj estos en daŭra kontakto kun la organiz-

anto de la kunveno s-ro Claude Nedjar, p/a Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris 10, Francujo.

Intertempe mi donas al vi jenajn detalojn pri la kunveno:

1. *Dato*: La kunveno okazos tutcerte en la dua duono de julio, 1962, kaj daŭros proksimume 10 tagojn.
2. *Partopreno*: Rajtos partopreni gejunuloj inter 16 kaj 25 jarojn aĝaj. La kondiĉo estas, ke ili nepre sciu Esperanton. En la rezolucio estas dirite, ke ili devus esti lernintaj la lingvon inter oktobro 1961 kaj julio 1962, sed mi opinias, ke tio ne estas absolute esenca. Se iu komencis lerni Esperanton pli frue, certe tio ne estas malhelpo por lia partopreno en la kunveno. Grava estas la bona regado de la lingvo.
3. *Kostoj*: La tuta restado en Romo estos je la kosto de la Internacia Asocio de Popoluniversitatoj. La vojaĝo ĝis Romo devas esti je la kosto de la partoprenontoj, sed eble la landaj asocioj de Popoluniversitatoj, aŭ la esperantistaj landaj organizaĵoj povos doni ian helpon. Oni devus klopodi ricevi subvencion por tiu celo ankaŭ de la ŝtataj aŭtoritatoj aŭ de iu bonfara instanco. Tio dependas de la cirkonstancoj en ĉiu unuopa lando.
4. *Nombro de partoprenontoj*: La nombro de gejunuloj, kiuj partoprenos el ĉiu unuopa lando, estu inter 3 kaj 10. La celo de tiu limigo estas atingi kiel eble plej internacian karakteron de la kunveno. Konsiderante tiun relative malgrandan nombron, mi opinias, ke per iom da bona volo ne estos malfacile havigi la financajn rimedojn por la vojaĝkostoj al Romo kaj reen. Tiurilate estas utile mencii, ke U.E.F., interkonsente kun la Franca Asocio de Popoluniversitatoj, kies prezidanto estas la estinta franca Ĉefministro s-ro André Marie, decidis, ke la 10 francaj lernantoj estos elektitaj dum Pasko el inter la plej bonaj gelernantoj de la porinstruistaj seminarioj, en kiuj nun Esperanto estas instruata en Francujo. Eble en aliaj landoj oni povus apliki la saman kriterion, sed tio estas nur sugesto.

Apenaŭ necesas emfazi la gravecon de la kunveno por antaŭenigo de la Internacia Lingvo precipe inter la junularo. Tial mi varme petas ĉiujn landajn organizaĵojn tuj ekagi, eventuale interkonsente kun la landaj sekcioj de la fakaj organizaĵoj, precipe de geinstruistoj, gestudentoj kaj junularo.

Mi petas ne skribi al mi pri tiu ĉi afero, sed rekte rilati kun s-ro Claude Nedjar ĉe U.E.F., Parizo.

KONSULTAJ RILATOJ DE UEA KUN UNESKO.

Kun grandega plezuro mi informas vin, ke la aganta Ĝenerala Direktoro de UNESKO informis min per letero ODG/RIO/A.741 de la 22-a de decembro 1961, ke la Plenuma Komitato de UNESKO decidis dum sia 60-a Sesio, okazinta en oktobro-novembro 1961, ke UEA havu estontece kun UNESKO kategorion B de rilatoj, nome la t.n. „Rilatojn de Informado kaj Konsultado” laŭ la nova Regularo pri Konsultaj Rilatoj kun UNESKO. Mi deziras atentigi, ke al la kategorio A apartenas organizaĵoj kreitaj de UNESKO mem, ekzemple diversaj Konsilantaroj; al la kategorio B apartenas nur la plej gravaj privataj organizaĵoj el tiuj, kiuj ĝis nun troviĝis en la Konsultaj Rilatoj kun UNESKO; al la kategorio C apartenas la malpli gravaj privataj organizaĵoj, kiuj ĝis nun havis Konsultajn Rilatojn kun UNESKO; fine, ekster kategorio troviĝas ĉiuj aliaj organiz-

aĵoj, kun kiuj UNESKO povas havi neformalajn rilatojn. La organizaĵoj de kategorioj A kaj B havas speciale favoran pozicion kun multaj avantaĝoj, konsiderinde pli grandaj ol estis la ĝisnunaj privilegioj de organizaĵoj en Konsultaj Rilatoj laŭ la malnova Regularo. Komprenoble, necesos atente studi ĉiujn eblecojn, kiujn UEA povos utiligi surbaze de la ĵus akirita nova pozicio. Vi povos esti certaj ke, same kiel ĝis nun, mi klopodos en mia funkcio de ĝenerala sekretario ŝarĝita ankaŭ pri la rilatoj kun UNESKO, atingi la maksimumon por la Asocio kaj por la Internacia Lingvo ĝenerale en la novaj kondiĉoj. Konsiderante la delikatecon de tiuj rilatoj, mi ankoraŭfoje plej varme, sed ankaŭ plej insiste petas ĉiujn landajn kaj fakajn asociojn *ne turni sin rekte al UNESKO, sed tion ĉiam fari pere de UEA, aŭ rekte, sed nepre post interkonsiliĝo kun mi.* La nova privilegiita pozicio estas rezulto de efika kunlaborado de UEA kun UNESKO en la lastaj jaroj, ekde la Konferenco en Montevideo, kaj mi utiligas la okazon por tutkore danki al ĉiuj, kiuj en ĉiu ajn formo helpis en ĉiuj agadoj de UEA organizitaj en la kadroj de tiu kunlaborado. Mi estas certa, ke estontece ni atingos pliajn sukcesojn sur tiu ĉi kampo. Kun tre koraj salutoj, sincere via

Rotterdam, la 8-an de januaro 1962. Prof. D-ro Ivo Lapenna

Enketo pri la Migrado de la Kukolo.

En 1961 mi aranĝis per Esperanto-revuoj enketon pri la migrado de la kukolo. Ĉirkaŭ 120 personoj afable informis al mi, kiam la unua kukolo aperis printempe en ilian lokon.

Malgraŭ tiu sufiĉe granda nombro, la enketo ne donas klaran bildon, ĉar tro multe mankas la informoj el suda kaj orienta Eŭropo, el orienta Azio kaj el norda Afriko.

Necesas refari la enketon dum pluraj sinsekvaj jaroj por ke la studo havu veran sciencan valoron. Mi tial denove petas la kunhelpon de personoj, kiuj loĝas eksterurbe, por ke ili havigu al mi en la printempo de 1962 jenajn informojn pri la kukolo:

- a) nomo de la loko kaj situo rilate gravan urbon;
- b) dato de la alveno de la unua kukolo;
- c) aspekto de la regiono;
- ĉ) (se eble) veterkondiĉoj dum la pasintaj tagoj;
- e) nomo kaj adreso.

Speciale interesaj estas la informoj el regionoj apud maroj aŭ montaroj, el insuloj, el norda Afriko kaj el orienta Azio.

La rezultoj de la unua enketo (1961a), baldaŭ aperos. Nur post kelkaj jaroj povos aperi pli ĝeneralaj, komparaj studoj. Per ili mi provus montri la utilon de Esperanto por internaciaj sciencaj enketoj.

W. de Smet, Graaf van Egmontstraat 16, Antwerpen, Belgujo.

Sekve de la enketo pri la migrado de la kukolo, stariĝis iniciata komitato por esperantlingva rondo de ornitologoj. Ĝi anigos ĉiujn esperantokonajn personojn, kiuj havas intereson pri birdoj en la plej ĝenerala senco: studado, observado, bredado, kolektado, kaptado, ĉasado, k.t.p. Personoj kiuj deziras informojn estas petataj kontakti kun la sekretario de la iniciata komitato:

H. Tiepermann, De Burburestraat 28, Antwerpen, Belgujo.

NI RECENZAS

BILDLIBRO PRI BESTOJ. Esperantigis W. A. Gething kun helpo de C. D. A. Capp kaj M. C. Butler. Eldonis: „Daily Mail”, Londono, 1961. 72 p. 33,5 x 26 cm bindita. Prezo 8 ned.guld. = 32 steloj + 10% sendkosto. — Jen grandformata, impona verko, kies eksteraĵo, montrante leonparon kun idoj, jam tuj tiras la atenton. La intereseĝa enhavo informas nin pri bestoj en la plej vasta senco: mamuloj ĉiuspecaj, birdoj, fiŝoj, insektoj, moluskoj, kaj ĉe koelenteroj kaj anelidoj — la estaĵoj vivantaj en la maro, kiuj aspektas kiel floroj, sed tamen estas animaloj — estas mallonge priskribitaj. La libro estas riĉe ilustrita: pli ol 400 bildoj en brilaj koloroj akompanas la priskribojn. Ĉi tiu belega, tamen malmultekosta verko, ne nur estas plaĉa posedaĵo, sed ankaŭ kvazaŭ ilustrita faka terminaro pri bestnomoj, do tre lerniga. Samtempe ĝi estas bonega propagandilo por nia lingvo, kiu montras al skeptikuloj, ke Esperanto estas vivanta lingvo kun nomoj por la plej strangaj estaĵoj. — La nomoj de la tradukintoj garantias perfektan lingvon. La fakto, ke mondfama eldonejo volis aperigi ĉi tiun libron, donas al la esperantistaro la moralan devon, aĉeti la verkon: se granda kvanto restus nevendita, oni certe ne konsentus al pluj eldonoj! Mendu ĝin tuj ĉe nia Libro-Servo.

NOVA EZOPO, originala poemaro de *Ștefan Urban*, kun antaŭparolo de *Poul Thorsen*. Ilustraĵoj de *Jaromír Skrivánek*. 19 x 12 cm 128 paĝoj. Beletraj Kajeroj no. 9. Eldonis: *J. Régulo, La Laguno, Kanariaj Insuloj*. Prezo: 3,75 ned.guld. = 15 steloj. — La lerta poeto kvazaŭ ludas per vortoj; li prezentas al ni grandan kvanton da mallongaj poemoj, ĉarmaj alegorioj pri ĉiutagaj temoj. Frandaĵo por ŝatantoj de la poezio! *

BILDKARTOJ PRI ROTERDAMO. La Esp. Soc. „Merkurio” en *Roterdamo* antaŭ nelonge festis sian 55-jaran jubileon kaj tiuokaze eldonis serion de 4 koloraj fotokartoj pri la ĉefaj vidindaĵoj de sia urbo. Kompreneble la klarigoj estas en Esperanto. La prezo de 0,40 guld. aŭ 2 steloj por la tuta serio estas tre malalta. Mendu ilin ĉe la eldoninto, s-ro J. D. Brakel, Harddraverstr. 74, Rotterdam aŭ ĉe nia Libro-Servo. *

POŝTKARTO D-RO L. L. ZAMENHOF, Aŭtoro de *Esperanto*. La tre fekunda „*Esperantaj Francaj Eldonoj*” en *Marmande* deziras eldoni, okaze de la 75-jara ekzistado de nia lingvo, kelkajn jam delonge elĉerpitajn, tamen ofte petitajn verkojn de D-ro Zamenhof, i.a.: *Lingvaj Respondoj, Hamleto, Marta*, ktp. Por akiri la bezonatan kapitalon, oni unue eldonis il. p.k. kun bildo de la Majstro kaj vendas ilin, pere de (ankaŭ nia) L.S.; prezo: 2,— guld. = 8 steloj por 10 ekz.; 3,50 guld. = 14 steloj por 20 ekz., afrankite. *

Truus Durenkamp.

NOVA CIVITO, revuo dumonata en Esperanto. Ĉefredaktoro: *Igino Giordani*; redakcio kaj administracio: Via della Scrofa 14, *Romo, Italujo*. Unua numero dec. 1961 - jan. 1962; formato 34 x 24,5 cm; jara abonprezo: 29 steloj.

En granda formato riĉe ilustrita aperis la unua numero de nova revuo kiel Esperanto-eldono de *Città Nuova*. La ilustraĵoj estas belaj, same la presaĵo; la enhavo de la artikoloj religiaj, kulturaj, sciencaj estas aktuala kaj altnivela. La lingvo ĝenerale tre bona. Tial ni varme rekomendas aboni ĉi tiun revuon kaj montri ĝin al viaj geamikoj.

H. G. Wannemakers S.J.



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 31,01 - 31,45 - 31,50 - 41,12 - 41,99 - 42,11 - 48,43 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 9675 - 9540 - 9525 - 7295 - 7145 - 7125 - 6195 - 1205 kc/s.

Premioj estas lotumitaj inter la aŭskultantoj. Petu demandaron al: *Pola Radio, Esperantaj Disaŭdigoj, Varsovio, Pollando*, kiu tre interesiĝas pri la aŭdebleco en diversaj landoj.

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA; merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

FEBRUARO 1962

2: Grandaj Sanktuloj, S-ta Bonaventura; 6: Tra la literaturo; 7: Kuriero de Esperanto; 9: Leterkesto kaj bibliografio; 13: Novajoj el Italujo; 14: Kuriero de Esperanto; 16: La poeto de la itala Releviĝo, G. Carducci; 20: Italaj kanzonoj en Esperanto; 21: Kuriero de Esperanto; 23: Italaj belartaj urboj, Rimini; 27: Karnavalo en Italujo; 28: Kuriero de Esperanto.

RADIO BERN, SVISUJO. Lunde kaj merkrede de 13.20 - 13.30 h., jaŭde kaj sabate de 22.15 - 22.30 h. MET, per la ondoj 31.46 kaj 48.66 m. (9535 kaj 6165 kc/s). Lunde kaj jaŭde parolas d-ro Arthur Baur, merkrede kaj sabate prof. d-ro Edmund Privat.

Aŭskultu la programojn en Esperanto kaj regule skribu al la koncernaj stacioj por danki kaj kuraĝigi al pliaj elsendoj.

RADIO WIEN, programoj II kaj III dissendas ĉiumarde *Informojn pri Aŭstrujo*, ankaŭ koncerne religiajn okazintaĵojn, en Esperanto.

FILOZOFAJ KONFESIOJ

Volas esti mi *idealisto*,
Ignoranta dirojn pri fatalo,
Sed sekvanta firme kun persisto
Al la ekkonita idealo!


Estas tamen mi ja *realisto*,
ĉar en tagaj bruoj kaj bataloj
DIO Liaj signoj de ekzisto,
Por mi estas fakto kaj realo!

Estas ankaŭ mi do *optimisto*,
ĉar en la ĉiama homa dramo
Fortkonvinke min instruas KRISTO
Pri la fina venko de la amo!

Same estas mi *esperantisto*,
ĉar en mondsituo jen minaca
Lingvaj baroj vokas kun insisto
Al komuna lingva il' porpaca!

Walter Mudrak, Wien.

KRUCVORTENIGMO.



Horizontale:

- A. tabelo, redaktita en alfabeto ordo;
raba birdo.
- B. intence krime mortigi; plej grasa parto el la lakto;
- C. ordinara literatura verko sen versoj; sennuba, hela, (r).
- D. amfibia besteto; banano (r).
- E. resti sur seĝo; persona pronomo;
- F. vojo; loĝejo por birdoj;
- G. organo de aŭdkapablo; porkograso
- H. procedo per kiu oni evitas en ĥirurgio la alporton de infektantaj ĝermoj; alimaniere.
- I. elporti (r); pordiserva ornamo pendants de ĉirkaŭ la kolo ĝis la genuoj (r).
- J. melodio (r); manĝaĵo el kirlitaj ovoj (r); saketo alkudrita al vestaĵo (r);
- K. denove.

L. libro por konservi fotografiaĵojn k.t.p. (r); ŝipestro (r).

M. meti kuglojn en pafilon; fortega detruema ventego;


N. taŭge; malgranda preĝejo (r);

O. honora nomo; operacii per nombroj por trovi alian serĉatan nombron (r).

P. produktaĵo de birdo (r); speco de forta hundo (r); el multvalora metalo.

Vertikale:

- efekto; aparato por malplirapidigi la defalon de iu en aero.
- sola; prepozicio; neabsolute, proporcie (r).
- perei per sufokiĝo en akvo (r); daŭre esti en sama loko; Eŭropano (r).
- viro laŭleĝe ligita kun virino por fondi kun ŝi familion; avenuo; plumbaj globoj per kiuj oni ŝarĝas pafilojn.
- demanda pronomo; trunketo de greno restanta post la falĉado; dolĉa suko, kiun la abeloj suĉas el la floroj (r);
- nomo de papo; disĵeti grajnoj sur tero por ke ili ĝermu kaj kresku (r);
- difekti per kombino kun oksigeno (r); refaldita bordero ĉe tuko au vesto (r); bakajo el delikata pasto kun sukero (r).
- glueca brulebla suko de kelkaj arboj precipe de koniferoj (r); brando eltirita el rizo.
- de iu metalo; facile fleksebla (r); tropika birdo scianta imiti la homan voĉon (r).
- hebrea vorto signifanta „tiel estu”; rapide sin movi, subite levante ambaŭ piedojn de la loko, kie oni staras kaj ree sin starigante sur ili (r); signo stampita sur moligita substanco por certe konfirmi dokumenton (r).
- havante grandan etendon laŭ sia plej granda dimensio (r); tri personoj kune (r); blanka pudro por ŝmirado de la haŭto.





Mi dezirus ricevi senpage katolikajn gazetojn el la tuta mondo por disdoni. Mi antaŭdankas ĉiujn kiuj helpos min. La paroĥa delegito pri presajoj, S-ro Franco Galbusera, *Parrocchia Tomba, Verona, Italujo*. *

Aliĝu al la Magnetofona Rondo de LAF „Birdanoj pepas”. Informoj ĉe la

rondestro: Stefan Maul, Bismarckplatz 2, 84 *Regensburg-2, Germanujo*. *

Mi deziras korespondi kun samideano en Nederlando aŭ Danlando pri ĉiutemo. S-ro F. Richter, *St. Florian ĉe Linz, Aŭstrujo*. *

Mi deziras praktiki Esperanton per korespondado kun gesamideanoj nederlandaj. F-ino Mercedes Sánchez Pascual, Calle de Madrid 11, *Burgos, Hispanujo*. *

Ĉu iu scias, kiu *germana* episkopo estris en la mezepoko en *Assisi*? B.v. informi min, se estas konate. Rekompence mi sendos laŭdezire ilustr. poŝtkartojn aŭ poŝtmarkojn al la respondinto. S-ro A. Padberg, Ressweg 14, *13b Gilching, Germanujo*. *

Por mia lingva laboro mi bezonas trastudi la Zamenhofan Malnovan Testamenton. Kiu volas liveri al mi la Esperantan Biblion kontraŭ la verko „Quo Vadis” de H. Sienkiewicz? S-ro G. Zaletov, Nekrasovskaja 40, *Rostov-na-Donu 2, USSR*. *

Okaze de jarfino mi ricevis tiom da bondeziroj kaj salutoj, ke ne estas eble al mi speciale danki al ĉiu. Permesu, ke mi sur tiu ĉi vojo sincere dankas al ĉiuj estimataj gesinjoroj kaj geamikoj pro la bondeziroj, kiujn mi respektplene kaj kore rediras. La Disinjoro benu kaj protektu vin ankaŭ dum la jaro 1962! —

Plue mi dankas al ĉiuj, kiuj akurate kaj malavare pagis la abonprezon kun la biblia krompago, per kio ili ege faciligas miajn taskojn.

Fizika bonfarto kaj anima paco feliĉigu ĉiujn IKUE-anojn.

Germana reprezentanto Hans Stahl Weiden (Oberpf)

ENKETO PRI KURIOZAJ PREĜEJOJ.

En Francujo oni povas rimarki kelkajn preĝejojn kun arkitekturaj strangajoj.

Ekz. en TRIEL (20 km N. de Parizo) kaj en NOGENT-LE-ROTROU (120 km Okc.) strato pasas sub la preĝejo, kiel tunelo.

En CHEVREUSE (25 km Okc.), SAINT-VRAIN (20 km S.) kaj THIAIS (10 km S.), oni iam ŝanĝis la orientiĝon de la preĝejo, t.e. la altaro staras nun tie, kie estis la ĉefa enirpordo, kiam oni konstruis la preĝejon — kaj inverse.

S-ro R. JOSSINET, 222, rue La Fayette, PARIS-10e, Francujo, deziras scii, ĉu ekzistas tiaj similaj ekzemploj en aliaj landoj.

Bv. sendi viajn afablajn respondojn al li.

12. persono kiu pozas antaŭ artisto por esti desegne aŭ pentre reprezentata; membro (r); sovaĝa eŭropa bovo (r).

13. maniero laŭ kiu iu pensas aŭ juĝas (r); havanta altajn moralajn kvalitojn.

Li de Jong-Roobeek